

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
119
vintro 2019/2020



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

prezidanto

Pierre Oliva

Eden Park n° 99

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

06 76 55 57 23

nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la kasisto

Nicole Lafitte

(ĉe la supra adreso de

Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain

48 avenue Alexis Godillot

83400 Hyères

06 42 19 68 51

pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°
31-a de marto 2020**

bonvolu sendi al la supra retadreso

><><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la Prezidanto

La ĵus pasinta jarfino estis iel stranga! Unuflanke stampis ĝin la ĝojo de la infanoj, kiuj profitis la vintrajn feriojn kaj festojn... aliflanke karakterizis ĝin la malfacilaĵoj naskitaj de la decembraj strikoj, eĉ se tiuj gravas por pli feliĉa estonteco.

Sine de nia federacio, ni devas daŭrigi niajn klopodojn kaj laboron, malgraŭ eventoj kaj malfacilaj momentoj, kiuj foje ilin bremsas.

Al ĉiuj anoj kaj apogantoj de Espéranto-Provence mi sendas miajn bondezirojn por la nova jaro kaj dezirojn pri plua efika laboro por nia movado.



**Feliĉan Novan Jaron
al la membroj kaj apogantoj de nia federacio**

enhavo

2	jarraportoj 2019	9	vojaĝemaj kaj sportumemaj federacianoj
5	Kultura Semajnfino en Le Beausset	10	tradukemaj federacianoj
6	El la regionaj asocioj	11	ZEO en Gap
7	Provencaninoj ĉe UNESKO	12	agendo
		+	por la reta versio suplemento pri Reunio

Ne forgesu pagi la aliĝkoton por la jaro 2020 - 6 € - al Esperanto-Provence

ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Nicole Lafitte
(aliĝilo aldonita fine de tiu ĉi gazeto - p.11 kaj 12 - kopiu aŭ tondu ĝin)

Dankon!

N'oubliez pas de payer la cotisation pour 2020 - 6 € - à Esperanto-Provence

soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorière, Nicole Lafitte.
(bulletin d'adhésion joint à la fin de ce journal - p.11 et 12 - à copier ou découper)

Merci !

Federacia agado

Federacia membro-kunveno / Assemblée générale de la fédération

dimanĉon la 1-an de marto 2020 - je la 14-a 30

Les Issambres (Var) - Résidence Vacanciel du Val d'Esquière

kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno

Bonvolu legi la sekvajn moralan, agadan kaj finanĉan raportojn por la jaro 2019.
La kunvokilon kaj voĉdonan rajtigilon (en okazo de via neĉeesto) vi ricevos en februaro.
Vous recevrez en février la convocation et le pouvoir (pour le cas où vous ne seriez pas présent).

1 - Morala raporto

Pierre Oliva

La nombro de novaj partoprenantoj en niaj kluboj ne kreskas.

Dum la pasintjara federacia membro-kunveno, ni ĉiuj tre interesiĝis pri la bonfarto de nia federacio .

En Le Beausset, ni sekvis serioze la sorton de la lerno-libroj « Esperanto-express » kaj « Méthode 11 », kiujn ni donacis al la mediateko.

Ni konstatis kun feliĉo, ke tiuj verkoj preskaŭ ĉiam for-estas el la breto.

Do, iu(j) uzas ilin kaj eble lernas Esperanton! Sed neniu alvokas nin por kontakti la klubon.

Kiuj personoj prunteprenis la librojn, kaj kial?

Ve, mi devas konstati, ke nia donaco al la urba biblioteko ne helpas nian federacion.

Mi estas iomete ĉagrenita pro tio, sed ne senespera!
Mi petas, ke ankaŭ vi pripensu, trovu solvojn por evoluigi niajn federaciajn klubojn, kaj ke dum la venonta membro-kunveno en Les Issambres, ni kune diskutu pri efikaj rimedoj por grandigi niajn Eo-asociojn.

Mi malfacile akceptas, ke la retaj lernantoj ne serĉas kontaktojn kun aliaj esperantistoj ekster la reto.

Kial lerni, se ne sekvas uzado de la lingvo?

2 - Agadraporto

Pascal Vilain

1 - Membraro

Esperanto-Provence havis 79 membrojn je la 31a de decembro 2019.

38 pagis al UFE (el ili : 10 pagis nur al UFE, 12 pagis la grupan kotizon (Marseille kaj Gap), 7 pagis al UFE kaj la Federacio, 9 pagis al UFE kaj sia klubo)

23 pagis nur al la Federacio

18 pagis nur al sia klubo

2 – Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

2-1 deklaritaj asocioj

- kiuj plu ekzistas kaj pli malpli aktivas

04 - Manosque - E.K.E.M. (Esperanta Kulturo en Manosque): 2 federaciaj membroj

05 - Gap - Esperanto-Gap : 2 federaciaj membroj

13 - Marseille : 10 federaciaj membroj

ttt-ejo : <http://esperanto.marseille.over-blog.com>

83 – Saint-Raphaël: Espéranto-Club Saint-Raphaël > 17 federaciaj membroj

83 – Le Beausset: Espéranto–Le Beausset > 9 federaciaj membroj

84 – Avignon: K.E.C.A. (Kultura Esperanto-Centro de Avinjonon)

- kiuj plu ekzistas administracie sed ne aktivas

13 – La Roque-d'Anthéron: Espéranto-La Roque

13 – Miramas: G.E.M. (Groupe Espéranto Miramas)

2-2 antenaj grupoj de Espéranto-Provence

13 – La Ciotat ; 83 – Hyères

3 – Administrado

estraranoj (3):

prezidanto: Pierre Oliva

sekretario: Pascal Vilain

kasisto: Nicole Lafitte

aliaj komitatanoj (5):

Monique Arnaud, Marc Gallardo, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez

gazetrespondeculo: Pascal Vilain

retejrespondeculoj: Thierry Spanjaard, Pascal Vilain

reprezentanto de nia federacio ĉe Espéranto-France: Pascal Vilain (anstataŭanto: Renée Triolle)

membrokunveno:

Ĝi okazis en Les Issambres (83) la 3an de marto, okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno.

25 partoprenintoj + 17 senditaj rajtigiloj

komitatkunsidoj:

> marto 3: Les Issambres (post la membrokunveno)

> junio 21: La Ciotat (ĉe Renée Triolle)

> septembro 19: La Ciotat (ĉe Renée Triolle)

> decembro 1: Le Beausset

(post la Kultura Semajnfino)

4 – Instruado

- kursoj

> en la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon,

> en « Lycée de la Méditerranée » en la Ciotat instruis Renée Triolle

- staĝoj

> marto 2/9 - Les Issambres (83):

Mediteranea Esperanto-Semajno

> decembro 1/2 - Le Beausset (83): Kultura Semajnfino (kursoj gviditaj de Mari-Roza Vilain, Pascal Vilain, Renée Triolle)

- ekzamenoj

> junio 22 – Le Beausset: FEI-ekzamenoj (1a kaj 2a gradoj); tri kandidatoj, ĉiuj sukcesis



5 – Informado – komunikado

> dum la tuta jaro, disdonado de "Le Monde de l'espéranto" (Renée Triolle en La Ciotat kaj Marseille, Rosy Inaudi en sia regiono, Pascal Vilain en Dracénie kaj poste en Hyères)

> dum la tuta jaro, en Marseille (Brasserie les Danaïdes, 4 square Stalingrad, 13001 Marseille), la 1an jaŭdon de ĉiu monato: Lingva kafejo

> ekde septembro, en Hyères (Hotelo Ibis-Gare), la lastan merkredon de ĉiu monato: Lingva kafejo

> marto 11/18 – La Ciotat: ekspozicio pri Esperanto en Lycée de la Méditerranée

> septembro – Gap, La Ciotat, Le Beausset, Marseille: «Forumo de la asocioj»

> diversaj ĵurnalartikoloj pri niaj agadoj en «Le Dauphiné Libéré» (Gap), «Var-Matin» (Le Beausset, Hyères, Saint-Raphaël)

6 - klubaj eventoj

> januaro 3/5 - La Ciotat kaj Saint-Raphaël : vizito de usona paro, pikniko kaj vespera manĝado, noktaj restadoj

> januaro 22 - Marseille: reĝkuka festeto + lanĉo de la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj (Unesko)

> januare - Manosque: ĝenerala kunsido > decido pri «endormigo» de la asocio

> februaro 3 - Saint-Raphaël: reĝkuka festo + membro-kunveno

> majo 5 – Saint-Raphaël: la planita pikniko okazis ne ekstere sed ĉe la ge-Prezioso

> junio - Avignon: kultura tago kaj pikniko

> junio 23 - Saint-Raphaël: komuna manĝado kaj distra posttagmezo en Les Issambres (23 partoprenantoj)

> aŭgusto 3 – La Ciotat: vizito de du ĉinoj, komuna pikniko (11 partoprenantoj).

> decembro 15 - Saint-Raphaël: Zamenhof-tago

> decembro 15 - Avignon: 41-a Zamenhof-tago kun prelego de Sylvaine Lemagadure

7 – movadaj eventoj

- > marte – La Bastide-sur-l’Hers (09): 26a staĝo pri ĥora kantado – partoprenis N.Lafitte kaj P. Oliva
- > marte – Irano: M. kaj C. Castillon vojaĝis tra Irano kaj partoprenis en la 12a MONA-kunveno. (MezOrienta kaj NordAfrika Kunveno).
- > aprilo 12-16 – Dovro (Britio): Brita-Franca Kongreso. Partoprenis 5 Provencaĵoj.
- > julio 20/27 – Lahti (Finlando): «104-a Universala Kongreso de UEA». Partoprenis 4 Provencaĵoj.
- > oktobro 26 /novembro 3 – Baugé (Kastelo Greziljono): staĝo «Aŭtune»; partoprenis N. Lafitte kaj P. Oliva.

8 – kulturaj kaj alispecaj eventoj

- > januaro 5/12 – Le Beausset: ekspozicio de Christine Biancheri > «Sur le chemin de l’espéranto»
- > februaro 16 – La Ciotat kaj Le Beausset: akcepto de Neven Kovačić (prelegturneo en Francio) - prelego pri Kroatio
- > februaro 21 – La Ciotat: Internacia Tago de la Gepatra Lingvo
- > majo 11 – La Ciotat: «Eŭropa Festo» budo de Espéranto-La Ciotat
- > majo 18 – Marseille: 2a Forumo de Lingvoj
- > aŭgusto 26/28 – Salt Lake City (Usono): Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la civila socio; partoprenis Renée Triolle kun UEA-delegacio.

- > oktobro 18/20 – Parizo: Internacia Naturista Naĝ-konkurso; partoprenis skipo de INOE, el kiu 6 Provencaĵoj; ricevis medalon 3 el ili.
- > novembro 12/27 – Parizo: Ĝenerala Konferenco de UNESKO kaj Internacia NRO-Konferenco; partoprenis Renée Triolle por UEA, Josiane Moirand kaj Monique Arnaud por ILEI.

9 – diversaj eventoj

- > januare: Usona paro gastis ĉe Renée Triolle en La Ciotat kaj ĉe M. kaj P. Prezioso en Saint-Raphaël
- > januaro 31 – forpaso de Viviane Occelli-Cabaret, iama ano de nia federacio loĝinta en Contes (06)
- > februare: artikolo de Renée Triolle pri UNESKO en « Esperanto » n° 1332
- > marto 1: forpaso de Michel Simon, lasta prezidanto de Espéranto-Cannes
- > marto 27: forpaso de Daniel Moirand, el Aix-en-Provence
- > julio/septembro: Alain Rémy bicikle vojaĝis tra Eŭropo.

10 – venontaj okazaĵoj

- > februaro 29 / marto 7 - Les Issambres: Mediteranea Esperanto-Semajno
- > novembro aŭ decembro 2020 - Kultura Semajnfino en Le Beausset: datoj, kursoj kaj distra programo decidotaj

3 - Financa raporto

Nicole Lafitte

bilan financier 2019			
recettes		dépenses	
cotisations	378,00	gazette (impression et envoi)	325,00
dons	197,00	abonnement UVH	17,00
ventes de livres lors du stage	31,00	investissements	672,00
		(vidéo-projecteur et tente Barnum)	
		déplacement Paris pour Eo-France	64,00
		La Poste	8,00
stage Le Beausset*	1030,00	stage Le Beausset	1081,00
* reste à percevoir : inscription 58 €			
bilan provisoire du stage : déficit 51 €			
total des recettes	1636,00		
pertes au 31/12/2019	531,00		
total	2167,00	total	2167,00
solde au 31/12/2019 : compte courant : 1541,22 € ; livret épargne : 4635,62 €			
la trésorière: Nicole Lafitte ; le président : Pierre Oliva			

Kultura Semajfino en Le Beausset

Marc Chaminade

Ne nur staĝo sed ankaŭ vojaĝo en Esperantolando

Je la 30a de novembro kaj la 1a de decembro okazis staĝo organizita de Espéranto-Provence ĉe «Domo de la Fratoj», en Le Beausset. Estas bela konstruaĵo en verda parko, kie loĝas familioj atendantaj pli favorajn momentojn.

Sabaton, la suno brilis kaj la kampo farbiĝis je ĉiuj helaj kaj ruĝaj aŭtunkoloroj. Estis bona aŭguro por la staĝo de Esperanto. Sekvante la indiksagojn, ni veturis en tiu idilia pejzaĝo ĝis parko antaŭ konstruaĵo, kie Nicole kaj Pierre gastigis nin kun granda zorgo kaj amikeco. Ili ne nur preparis la staĝon sed ankaŭ ĉiujn menuojn.

Post kafo, teo kaj kornaj bulkoj komenciĝis la kursoj. Je la unua nivelo, Mari-Roza, instruantino ĉiam ridetema, zorgis pri la komencantoj. Uzante bildojn kaj parolante pri ili, la lernantoj malkovris la ĉefajn gramatikajn regulojn kaj akiris grandan vortprovizon. (Pasintjare, mi partoprenis ŝian kurson kaj pasigis tiel ĝojajn kaj interesajn momentojn, ke mi iel emis ree aliĝi al ŝia kurso!)

Pascal instruis je la dua nivelo. Li konstruis tre logikan kurson pri la malsimilaj uzadoj de la internacia lingvo. Eĉ se liaj lernantoj havis tre malsimilajn nivelojn, li sukcesis interesi kaj amuzi ĉiujn dum la naŭ kurshoroj. Tio estis grandega afero. Dankon al li!

Renée zorgis pri la 3a nivelo. Kiel vi certe jam scias, ŝi estas mirinda esperantistino, delonga UEA-delegito ĉe UNESKO. Ĉar tiu mondskala organizaĵo decidis, ke 2019 estu "Jaro de indiĝenaj lingvoj", Renée vivigis tre intensan, interesan kaj aktualan atelieron pri tiu temo.



Thierry kaj Pascal pretigis ampleksan liston de ret-adresoj, kiujn ĉiu esperantisto devus posedi. Mirinda ideo! Ili prezentis ĝin sabaton vespere.

Inter la kursoj, dum la paŭzoj, eblis aĉeti novajn librojn, aŭ aliajn malnovajn tre malmultekostajn, kiujn Renée kunportis. Oni ankaŭ povis miri pri la rimarkinda pinego apud la konstruaĵo.

Pierre preparis ĉiujn bongustegajn manĝaĵojn, de supo ĝis desertoj. Li pasigis sian tempon en la kuirejo, por ke ĉiuj partoprenantoj povu profiti ĉiujn momentojn de la staĝo. Poste, la loĝantoj de la «Domo de la Fratoj» ricevis la neuzitajn manĝaĵojn.

Rimarkinde estas, ke dum la staĝo ni aŭdis preskaŭ neniom da krokodillingvo!

Dimanĉon, post la tagmanĝo finiĝis la staĝo.

Tiam komenciĝis kunsido de la estraro de Espéranto-Provence. Dume, Mari-Roza kaj Christine lavis kaj purigis la manĝilaron kaj kuirejon...

(ndlr: Ankaŭ Marc, la raportinto, efike helpis.)

Ni travivis la staĝon en mondo de amikeco kaj interŝanĝo kies ligilo estis Esperanto.

Dankegon al ĉiuj partoprenintoj kaj organizintoj!

Article et photo dans Var-Matin (3 décembre 2019) : LES ESPÉRANTISTES EN SÉMINAIRE



A l'appel de l'association Espéranto Provence présidée par Pierre Oliva, la Maison des frères a servi de cadre à l'édition 2019 du stage de langue Espéranto.



05 - Espéranto-Gap

Le Dauphiné Libéré
VOTRE RÉGION
 ALPES DU SUD Dimanche 15/12/2019
Journée mondiale de l'espéranto : c'est aujourd'hui



La Champsaurine Monique Arnaud (tout à droite) était à l'Unesco le mois dernier pour défendre la cause de l'espéranto.

L'espéranto se fête le 15 décembre. C'est l'anniversaire du jour où Zamenhof, le concepteur de cette langue, est né. L'espéranto est aujourd'hui parlé par plus de cinq millions de gens dans le monde. Loin d'être artificiel, il est un subtil concentré des langues d'origine latine, slave et germanique. Conçu pour être facile à apprendre et à parler, c'est la langue démocratique par excellence. Monique Arnaud est son ambassadrice dans le département. « J'aimerais tellement que les Haut-Alpins partagent mon amour de cette langue. Le premier avantage de l'espéranto est d'être la langue la plus facile à apprendre avec moins d'une page de grammaire à assimiler pour pouvoir se servir des verbes. Pour le pratiquer couramment, il existe de nombreuses méthodes, des cours dans votre région et des applications gratuites sur Internet. »



13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

Thierry Spanjaard

Espéranto-Marseille rekompencita de la urbo

La urbo Marsejlo decidis donaci premiojn al volontuloj reprezentantaj kelkajn asociojn. Espéranto-Marseille apartenas al tiuj premiitaj asocioj, ĉar ĝi estas unu el la plej malnovaj membroj de la asocio-domo. Efektive, Espéranto-Marseille aliĝis al ĝi en 1992, pli malpli ĝuste kiam tiu socia strukturo estis kreita de la urbo. La premioj estis disdonitaj dum ceremonio prezidata de la urbestro en la urbodomo. Astrid Millet, kasisto kaj sekretario, kaj Thierry Spanjaard, prezidanto de la asocio, ĉeestis por ricevi la rekompencojn. Ili havis oportunecon diri publike kelkajn vortojn pri Esperanto kaj pri sia asocio.



Astrid (dekstre) kaj Thierry prezentas sian asocion kaj nian lingvon al la publiko.



83 - Esperanto-Klubo Saint-Raphaël

Raphaël var-matin 4
 Vendredi 20 décembre 2019

Il n'est jamais trop tard pour célébrer l'Espéranto

Saint-Raphaël Les membres du club espérantiste ont fêté le 160^e anniversaire de la naissance du créateur de cette langue

Les locuteurs de l'espéranto célèbrent traditionnellement la naissance du Docteur Zamenhof, l'initiateur de la langue internationale, né il y a 160 ans le 15 décembre 1859. Les membres du club espérantiste de Fréjus - Saint-Raphaël n'ont pas dérogé à la tradition. Rejoints par quelques amis de Nice, Hyères et Correns, ils se sont retrouvés en fin de matinée, près de la plaque « Rue Zamenhof » à Saint-Raphaël. Avant le repas et l'après-midi récréative qui les attendaient, les participants, réunis autour de la présidente de l'association Denise Loisel, ont écouté l'allocution de Jean-Claude Roget, membre du club, qui leur a rappelé l'opinion de l'académicien Maurice Genevoix sur la langue internationale : « L'espéranto est en mesure d'exprimer les nuances les plus subtiles de la pensée et du sentiment. Il est propre à permettre, par conséquent, l'expression la plus juste, la plus littéraire, la plus esthétique et de nature à satisfaire les esprits les plus ombrageux et les plus particularistes ; il ne peut pas porter ombrage aux fidèles des langues nationales. »



Les membres du club espérantiste fidèles au rendez-vous. (DR)

Selon la suggestion de l'un des auteurs les plus connus dans cette langue, le Hongrois Julio Baghy, ce rendez-vous annuel permet aussi de fêter la culture espérantiste. Il s'agit de mettre l'accent sur son abondante littérature, originale ou traduite, et sur son caractère équitable, respectueux de la diversité linguistique et culturelle internationale. Au sein du club local, les projets pour 2020 ne manquent pas : assemblée générale en début d'année avec partage de la galette des rois, stage international aux Issambres du 29 février au 7 mars, sans oublier les cours donnés chaque mercredi de 15 heures à 17 heures à la Maison des Associations, rue de la Soleillette à Saint-Raphaël. #FrugInfo; 04.94.95.66.18 ou 04.94.83.06.88 site de la Fédération régionale : www.esperanto-provence.org

Krome, oni povas noti ke la "Kultura Esperanto-Centro de Marsejlo", laŭ sia oficiala nommaniero, estas ege pli malnova! Espéranto-Marseille estis fondita la 21an de marto 1932 ; tio tutcerte igas ĝin unu el la plej malnovaj Esperantaj asocioj, almenaŭ en nia regiono.

Dum siaj 87 jaroj, Espéranto-Marseille organizis multajn eventojn, i.a. la Universalan Kongreson en 1957, kiu allogis 1468 partoprenantojn kaj la Kongreson de Espéranto-France en majo 2016, kun 105 partoprenantoj.

Ankaŭ aliaj asocioj estis premiitaj. Unu el la ĉeestantoj komentis: "Oni vidas, ke la municipaj balotoj alproksimiĝas; ili trovas ĉiujn ajn kialojn pro provi plezurigi la voĉdonantojn."



Pascal Vilain



titolo de artikolo en Var-Matin
pri nia 1a septembra lingva kafejo

Nia decembra lingva kafejo okazis ne la lastan merkredon, pro Julfesto, sed unu semajnon pli frue, la 18an.

Ĉar nia grupo ne estas sufiĉe granda por renkontiĝi, kiel okazas en Saint-Raphaël, ĉe la Zamenhof-strato de Hyères, ni decidis ŝanĝi nek la lokon nek la horon kaj prefere kunveni por celebri la Tagon de la Esperanta Libro. Estis ja la fama hungara verkisto Julio Baghy, kiu sugestis, ke la esperantistaro festu ne nur la naskiĝtagon de Zamenhof, la 15an de decembro, sed ankaŭ la Esperanto-kulturon.

Ni do kunportis, i.a., ekzemplerojn de «La Eta Princo» (Saint-Exupéry), «La Grafo de Monte-Kristo» (Dumas - tradukita Esperanten de Daniel Moirand), kaj ankaŭ de la pli novaj «Higieno de l' murdisto» (Nothomb) kaj «Tagordo» (Vuillard - premio Goncourt 2017).

Kial nur tradukaĵoj? Ĉar ni esperis la ĉeeston de ne-esperantistoj (tio ne okazis), kiuj povus tuj trovi el tiuj titoloj konatajn verkojn de nia franca literaturo.

Ni ankaŭ parolis pri la kontribuadoj al nia kulturo de du loĝantoj de Hyères, Charles kaj mi, kutimaj partoprenantoj en nia lingva kafejo.

Charles Carrey, kies tradukoj de francaj klasikaĵoj regule aperas en la KancerKliniko, sub lia kaŝnomo Ŝarlerik d'Arroi, ankaŭ verkis eseon: «Senfrokigiĝinto», por la KromKancerKliniko.

Kaj mi aperigis tri verkojn en Esperanto.

De kelkaj monatoj, la mediateko de Hyères ricevas la revuon «Le Monde de l'espéranto» kaj posedas en sia katalogo la francan version de la konata biografio de Zamenhof: «La Homo, kiu defiis Babelon». Pri tiu verko, indas aldoni, ke ĝi estis verkita origine en la franca de René Centassi kaj Henri Masson, kaj poste esperantigita grandparte de nia samfederaciano Philippe Combot, kiu nun loĝas en Reunio. Cetere, Philippe ankaŭ kontribuis per tradukoj en la serio de specialaj literaturaj numeroj de «Franca Esperantisto» (eldonita de Unuiĝo Franca por Esperanto):

«Herodiasa» (Flaubert), «Pri la legado» (Proust).

Ĉu la cititaj titoloj vekis vian legemon?

Profitu... januaro ne finiĝis... vi ne malfruas por alprenado de jarkomencaj bonaj decidoj!



UNESCO Des Provençales actives lors de la Conférence Générale

Renée Triolle

Du 12 au 27 novembre s'est tenue à Paris la **40ème session de la Conférence Générale de l'UNESCO**.

Universala Esperanto-Asocio est en relations de consultations depuis 1954 et, à ce titre, participe aux activités de l'UNESCO, notamment à travers le Comité de Liaison. ILEI (les enseignants) est observateur.

Parmi les personnes accréditées, on trouve trois Provençales, Renée Triolle, chef de délégation de UEA, Monique Arnaud et Josiane Moirand.

Si les problèmes internes à l'Organisation (droit de vote pour les états qui n'ont pas payé leur contribu-

tion ou durée et renouvellements des mandats) ne nous concernent pas au premier chef, les rapports d'activité, ou les discussions sur les programmes - notamment l'éducation, les sciences ou la communication - nous intéressent au plus au point.

UEA a pu, pour la deuxième année consécutive, s'adresser aux ministres et ambassadeurs en séance plénière. (*voir le lien page suivante*)

Nos représentants ont fait du lobbying : contacts avec les délégations, distribution de documents dans les six langues officielles pour UEA, dans de nombreuses au-

tres langues pour ILEI, à la grande surprise des délégués, information sur la langue internationale, équitable quand la plupart du monde est obligée de parler anglais au lieu de se consacrer à ses propres recherches.

Nos Provençales n'ont pas chaumé !



«Après l'édition en espéranto du "Courrier de l'UNESCO", la prochaine étape sera la reconnaissance de l'espéranto comme "patrimoine immatériel de l'humanité".

Certains pays se sont déjà prononcés, reste à en convaincre d'autres.», conclut Renée Triolle.

de maldekstre dekstren:

Josiane Moirand, Jesper Jakobsen, Monique Arnaud, Renée Triolle, François Lo-Jacomo Martine et Max Demouy

Monique Arnaud

Raporto por ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), NRO (Ne-registara organizaĵo) ĉe UNESKO.

La 40a Ĝenerala Konferenco de UNESKO okazis de la 12a ĝis la 27a de novembro en Parizo.

Ekde la unua tago, ni dispartigis inter ni la flugfoliojn tradukitajn al 18 lingvoj kaj Martine Demouy disdonis al ni la liston de antaŭviditaj parolantoj; sin anoncis pli ol 178 el 193 partoprenantoj.

La nova teamo provis malkovri ne nur la homojn sed ankaŭ la lokojn por la nova tasko. ILEI havis 5 delegitojn, kiuj konsciis en kiu maniero, kun kiuj homoj ili pretas rilati; kaj certe, ĉiu el ni varbis en koridoroj, vicoj, restoracio kaj kokteloj. Oficiale ni kontaktis 60 ŝtatojn en la granda salono. Bedaŭrinde, kelkaj delegacioj alvenis ĉiam lastminute kaj estis malfacile renkonti ilin.

Ĉi tiun jaron, pli ol 200 ŝtat- kaj NRO-reprezentantoj petis parolvicon, kaj inter la lastaj UEA.

François Lo Jacomo brile alparolis la homojn.

[*Vi povas aŭskulti lin ĉi tie.*](#)

Same kiel en 2017, la ĉefaj temoj rilatis al la celo 2015-2030: daŭripova evoluigo, klimataj ŝanĝiĝoj kaj iliaj konsekvencoj. Multaj parolantoj plendis pri translokiĝo de homoj, lernejoj detruitaj... kaj pledis por altkvalita edukado por ĉiuj kun bone trejnitaj instruistoj, protektado kaj promociado de kultura diverseco, protektado de la indiĝenaj lingvoj kaj de mondaj heredaĵoj, rajto sin esprimi, protektado de ĵurnalistoj. Multaj delegacioj parolis pri multflankeco.

Same kiel en 2017, kiam eblis, ni provis prezenti al

homoj dokumenton en ilia gepatra lingvo.

La angla lingvo estis uzita 95-foje, la franca 30-foje; la reprezentantoj de kelkaj delegacioj uzis ambaŭ lingvojn. Daŭre pri lingvoj, ni aŭdis 15 fojojn la araban, 16 fojojn la hispanan, 3 fojojn la rusan kaj 1 fojon la ĉinan. Pli kaj pli da ŝtatoj ŝatas uzi sian nacian lingvon, tiel ni aŭdis 4-foje la portugalan, po 1 kelkajn aliajn lingvojn, la hindan, la serbo-kroatan, la turkan, la korean kaj kanzonon en la maori lingvo. En Myanmar, 54 lingvoj estas instruataj.

London la 18an de novembro okazis la transdono de la «Atlaso pri la indiĝenaj popoloj en Kanado» al la biblioteko de UNESKO.

La honora invitito estis Wilton Littlechild, granda ĉefo, kiu reprezentas la Asembleon de la Unuaj Nacioj en Kanado.

La 20an de novembro, pli ol 400 gelernantoj invadis la salonon por festi la 30an jariĝon de la Rajtoj de la Infanoj. La franca prezidento Emmanuel Macron ĉefe invitis ilin lukti kontraŭ ĉikanado kaj seksa turmentado. Kuraĝe, du adoleskantoj atestis pri siaj suferoj.

Poste, infana koruso bele kantis kanzonon, kiu rilatas al la problemoj de migrantoj, kaj venis fama franca slamisto: "Grand corps malade". En sia kanzono, li uzis rekantaĵojn por amdanki al siaj gepatroj.

La kvin ILEI-reprezentantoj estis Martine kaj Max Demouy, Jesper Jakobsen, kiu povis ĉeesti nur unu tagon, Josiane Moirand kaj Monique Arnaud.

Tre agema teamo, bonega etoso!

Renée Triolle

Inter la vojaĝemuloj de la gazeto 118, mi ne raportis pri la "**Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Civila Socio**", kiun mi partoprenis fine de aŭgusto en Salt Lake City (Usono) kun 5-homa delegacio de UEA (inter ili la ĵus elektita prezidanto, Duncan Charters, kiu prelegis en la Ciotat antaŭ du jaroj).

Ni sukcesis havi atelieron. Ni decidis, ke mi parolos en Esperanto (pli facile tradukebla en la anglan ol la franca); tio kreis grandan intereson pri la lingvo. Iuj rekonis min post du tagoj: "Vi estas la sinjorino, kiu parolas Esperanton."

Ĉu la 4 000 partoprenantoj, kiuj diskutis dum tri tagoj pri "Inkluziva kaj daŭra socio", savos la planedon?

Thierry Spanjaard - Prezidanto de INOE

Provencaj naturistaj esperantistoj gajnas medalojn en internacia konkurso

La Provencaj fakte reprezentas grandan parton de la plej aktivaj inter la naturistaj esperantistoj, alie dirite la membroj de INOE: Internacia Naturista Organizo Esperantista. Ili aparte sukcesis dum la internacia naturista naĝkonkurso, kiu okazis inter la 18a kaj la 20a de oktobro.

Ĉiujare, INF (Internacia Naturista Federacio) organizas internacian naturistan naĝkonkurson en diversaj lokoj. En 2019, unuafoje, la konkurso okazis en Parizo.

Ege pli grave por ni, unuafoje en 2019, Esperantio estis agnoskita samnivele kiel grandaj nacioj kiel Francio, Germanio, Britio, Italio, ktp.

Do INOE organizis teamon por partopreni en tiu evento. Bone reprezentante la tutmondecon de la Esperanta movado, nia teamo akceptis la nuran esperantiston de la tuta naĝkonkurso, kiu trairis oceanon por partopreni: Jeremio, kiu venis de Toronto, Kanado. Fakte, la plej granda parto de la teamo venis el Provenco: Chantal, Rosy, Monique, Marc, Mikaelo kaj mi. En nia teamo partoprenis ankaŭ lokulo: Didier, el Parizo.

La konkurso kunvenigis ĉirkaŭ 300 homojn. Tial, ĝi daŭris dum tuta sabato, ĉar oni konkuras laŭ aĝaj kategorioj kaj diverse: papiliono, brustono, dorsono kaj libera stilo; krome, je la fino de la tago okazis stafetaj konkursoj laŭ nacioj kaj laŭ familioj. Nia teamo tute fieris akiri medalojn okaze de sia unua partopreno:

- Chantal: du orajn medalojn,
- Rosy: unu bronzan medalon,
- Mikaelo: unu bronzan medalon.

La provencaj ŝovinistoj notos, ke nur la Provencaj de nia teamo akiris medalojn.

Post la naĝkonkurso okazis festa vespero. Dum la antaŭaj naĝkonkursoj, tiu festo kelkfoje estis iom teda kun longa vespermanĝo en brua etoso. Ĉi tiun jaron, la vespero okazis en la sidejo de la Franca Komunista Partio, konstruaĵo desegnita de la famega brazila arkitekto Oscar Niemeyer. La manĝo estis bonege preparita de asocio zorganta pri rifunĝintoj, servita bufedforme, kaj dum la vespero okazis spektaklo de naturistaj artistoj amatoraj. Komence de la vespero, ĉiuj estis vestitaj, sed ĉe la naturistoj, iom post iom, pli ol duono de la partoprenantoj senvestiĝis. Tiel ni povas diri, ke ni estis inter la verŝajne ne multnombraj homoj, kiu dancis nude en la sidejo de la Komunista Partio!



La INOE-teamo, el kiuj 6 Provencaj. Ĉu vi rekonas ilin?



La tri medalitoj: Rosy, Mikaelo, Chantal

(Pli da informoj disponeblas en «Naturista Vivo», la bulteno de INOE)

<https://www.esperanto-naturismo.org>



La Ĉiroj de la Vinberujo - Colette (Kolet) (1873-1954) - Tradukis Ŝarlerik d'Arroi *

Eta prezentado

La titolo de la teksto donis la nomon al novelaro tre fama en Francio. La Ĉiroj estas la unua skribaĵo kun signaturo de Colette. La antaŭaj verkoj, la serio da "Claudine" (klodin) estis subskribitaj de Willy (Ŭili), ŝia tiama edzo, kiu aldonis al la tekstoj de sia edzino kelkajn malĉastajn pecojn. La Ĉirojn tute skribis Colette, tiu mirinda verkistino. Tiu teksto iom flirtas kun aŭtobiografio.

Malnovtempe, nokte ne kantis najtingalo. Ĝi havis agrablan fadeneton de voĉo kaj ĝin matene vesperen lerte uzis, tuj je printempo. Ĝi leviĝis kun siaj kamaradoj, je griza kaj blua tagleviĝo, kaj ilia timigita vek-iĝo skuis lacajn melolontojn kiuj dormis sub la folioj de siringo.

Ĝi kuŝiĝis je la sepa aŭ sepa kaj duono, ie ajn, ofte en la florantaj vitoj kiuj odoras je rezedo, kaj ĝi tradormis ĝis la morgaŭo.

Ian printempan nokton, najtingalo dormis staranta sur juna sarmento, bulĵabote kaj klinkape, ŝajne pro gracia tortikolo. Dum ĝia dormo, la dornoj de la vinbero, tiuj rompiĝemaj kaj tenacaj ĉiroj, kies la okzale freŝa gusto iritas kaj sensoifigas, tiuj ĉiroj kreskis tiom forte, tiun ĉi nokton, ke najtingalo vek-iĝis katenigita, ĝiaj kruroj implikitaj de forkaj ligiloj, ĝiaj flugiloj senpovaj...

Ĝi kredis sin tuj mortonta, baraktis, ĝis forfuĝo post granda strebo, kaj dum la tuta printempo firme promesis al si ne plu dormi, ĝis kiam ne plu kreskos la ĉiroj.

Je sekvanta nokto, ĝi kantis, por tre zorge ne dormi:

Ĉiam kiam vito kres, kres, kreskas...

Dormi ne plu mi !

Ĉiam kiam vito kres, kres, kreskas...

Ĝi variaciis sian temon, ĝin girlandornamis virtuoze, ekamis sian voĉon, fariĝis tiu frenezeta kantisto, ebria kaj anhelanta, kiun oni aŭskultas laŭ la trudega deziro vidi lin kantantan.

Mi vidis kantantan najtingalon sub la luno, libera najtingalo kiu ne konsciis mian observadon. Kelkafoje ĝi ĉesas, kun klinata kolo, kvazaŭ ĝi en si mem aŭskultus la plilongigon de estingita noto...

Poste ĝi tutforte reprenas, ŝvela, kun malantaŭen klinita gorgo, kun mieno de amora malespero. Ĝi kantas por kanti, ĝi kantas tiom belajn aĵojn, ke ĝi ne plu scias kion ili signifas. Sed mi, mi ankoraŭ aŭdas tra la oraj notoj, tra la sonoj de basa fluto, per la trememaj kaj kristalaj triloj, pro la puraj kaj viglaj krioj, mi daŭre aŭdas la unuan naivan kaj timigitan kanton de najtingalo kaptita de la ĉiroj de la vinbero:

Ĉiam kiam vito kres, kres, kreskas...

Rompiĝemaj, tenacaj, la ĉiroj de amara vito min katenis je mia printempo dum mi feliĉe dormis sen malfido. Sed mi rompis, per timigita streĉiĝo, ĉiujn tiujn tordajn fadenojn, kiuj jam tenis sur mia haŭto, kaj mi fuĝis... Kiam la malvigleco de nova miela nokto pezis sur miaj palpebroj, mi timis la ĉirojn de la vito kaj mi laŭte ĵetis plendon, kiu al mi rivelis mian voĉon.

Sola, vekata en la nokto, mi nun rigardas supreniri antaŭ mi la volupteman kaj morozan stelon. Por malpermesi al mi refalon en feliĉa dormo, en la mensoga printempo kiam ekfloras la hoka vinbero, mi tiam aŭskultas la tonon de mia voĉo. Kelkafoje, mi febre krias tion, kion oni kutime prisilentas, kion oni tre mallaŭte flustras, - poste mia voĉo malviglas ĝis murmuro ĉar mi ne kuraĝas daŭri...

Mi dezirus diri, diri, diri ĉion kion mi scias, ĉion kion mi opinias, ĉion kion mi divenas, ĉion kion min plaĉegas kaj min vundas kaj min mirigas; sed ĉiam, proksime de tagiĝo de tiu sonora nokto, venas freŝa mano kiu sin metas sur mia buŝon, kaj mia krio, kiu ekzaltiĝis, reiras al modera vortuzo, al parolfluemo de infano, kiu laŭte parolas por kvietiĝi kaj ebriiĝi...

Mi ne plu konas feliĉan dormon, sed mi ne plu timas pro la ĉiroj de la vinberujo.

ndlr: Ŝarlerik d'Arroi estas pseŭdonimo de nova ano de nia federacio, loĝanta en Hyères.

ZEO-oj en Regiono SUD > 9 - Gap (05)



ndlr: Il m'a été très difficile de récolter des informations sur la Rue de l'espéranto de Gap. Je tiens cependant à remercier M. Frédéric Robert, Assistant de conservation aux Archives départementales des Hautes-Alpes, qui m'a adressé le message suivant, en réponse à ma demande :

"Suite à notre entretien, je vous informe que j'ai pu obtenir quelques renseignements sur la rue de l'Espéranto à Gap.

En effet, c'est lors du conseil municipal du 12 février 1966 que fut adoptée la délibération donnant à une rue de Gap la dénomination de rue de l'Espéranto.

C'est le groupe espérantiste de Gap qui avait formulé le souhait de voir une rue de la ville porter le nom de l'Espéranto.

La commission a estimé recevable cette demande et a choisi la rue nouvellement créée qui desservait le groupe d'HLM Les Cèdres.

Par ailleurs, je n'ai pas retrouvé d'article ou de photos de l'inauguration (Alpes et Midi, Fol Per 132, 1966)."

La Kultura Esperanto-Centro de Avinjono informis nin pri la forpaso de sia amiko kaj klubano **Hélène Gente**, la 17an de novembro 2019. La membraro de Esperanto-Provence sincere funebras kaj kondolencas la familianojn kaj la membrojn de la Avinjona klubo.

Adhésion 2020 à la Fédération Espéranto-Provence

Nom : Prénom :

adresse :

tél : courriel :

- vous adresse sa cotisation annuelle de 6 €
- en plus de cette cotisation, aide la fédération en versant la somme de :
 10 € ; 20 € ; autre montant : €
- désire recevoir la gazette de la fédération par : La Poste ; Internet ; les deux

et retourne le présent bulletin d'adhésion, dûment complété, accompagné du règlement par chèque à l'ordre de « Fédération Espéranto-Provence » :

à Nicole Lafitte - Eden Park n°99 - 2772 Montée du Vieux Camp - 83330 Le Castellet

date : signature :



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

janvier 25 - Saint-Raphaël (chez M. et L. Prezioso) :

Galette des rois + Assemblée générale du club local

mars 1 - Les Issambres - Résidence Vacancier

14h30: Assemblée Générale d'Espéranto-Provence

février 29 / mars 7 - Les Issambres

"Mediterranea Esperanto-Semajno"

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes

4 square Stalingrad, 13001 Marseille

dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare

45 rue Edith Cavell (face à la gare)

en France

février 15-22 - Verniolle (09) : 27ème stage de chant

choral - infos : tutpeko@aliceadsl.fr

février 24-28 - Bouresse (86) - Kvinpetalo

stage de février - conversation + littérature et traduction

- <http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

avril 10-14 - Baugé (49) - Château de Grésillon

Congrès de SAT-Amikaro

infos : daniel.lachassagne@orange.fr

Baugé (49) - Château de Grésillon :

avril 17-25 - 10ème "PRINTEMPaS"

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique20&lang=fr>

avril 30 / mai 4 - rencontre chorale d'Interkant + randonnée + Land-Art...

juin 6-14 : deuxième semaine cycliste

infos : kastelo@gresillon.org

août 15-21 - Plouézec : Rencontres d'espéranto

infos : pluezek@armor-esperanto.fr

en Europe

avril 30 / mai 4 - Comillas (Espagne)

79ème Congrès d'Espéranto-Espagne

juillet 11-18 - Someren (Pays-Bas)

76ème Congrès international de la Jeunesse

infos : ijk2020.tejo.org/

juillet 25 / août 1 - Białystok (Pologne)

93ème Congrès de SAT - kontakto@satesperanto.org

dans le monde

août 1-8 - Montréal - (Canada) : 105ème Congrès

mondial d'espéranto - infos : kongresoj@co.uea.org

Aliĝo 2020 al la Federacio Esperanto-Provence

Familia nomo: Persona nomo:

adreso:

telefonnumero: retadreso:

- sendas al vi sian aliĝkotizon 6 €
- plie, helpas la federacion donacante kroman sumon:
 - 10 € ; 20 € ; alia sumo: €
- ŝatus ricevi la federacian gazeton: poŝte rete poŝte + rete

kaj sendas la kompletigitan aliĝilon kun ĉeko al «Fédération Esperanto-Provence»:

al Nicole Lafitte - Eden Park n°99 - 2772 Montée du Vieux Camp - 83330 Le Castellet

dato: subskribo:

Maggy kaj Philippe Combot

Nova hejmo

En Oktobro ni finfine povis loksidiĝi en nia nova apartamento en Saint-Denis. Ĝi estas tre trankvila, kvankam ne malproksima de la centro de la urbo, ĉar de la strato, kiu jam mem estas ne brua, oni atingas ĝin tra luksa aleo, kiun borderas bela vico de palm-arboj.

Ni havas vastan terason, de proksimume 70 kvadrataj metroj, sur kiu Maggy baldaŭ instalos legomĝardenon!

Ni finfine ankaŭ ricevis nian aŭton. Oni transportis ĝin de Marsejlo al Le Havre, kaj poste sur ŝipo al Reunio. Tiu vojaĝo daŭris de Julio ĝis Oktobro! Sed la aŭto ne tro suferis pro senpaciencaĝo, ĝi senruste ripozis kaj tuj akceptis bonfarte kaj plenforte refunkcii.

Ni do povis komenci malkovri la insulon. Ni jam vidis plurajn belajn akvofalojn (Cascade Maniquet kaj Cascade Langevin). Ni ĝuis la longan plaĝon nomatan «L'Ermitage» en Saint-Gilles. Ni vidis neniun ŝarkon, ĉar tiu loko estas malprofunda do ŝarkimuna. Kaj ni pasigis du tagojn en la Cirko de Cilaos. Cilaos estas vilaĝo en la montoj, je la altitudo de 1700 metroj, ĉirkaŭata de montoj, kvazaŭ meze de cirko. Tie oni kulturigas vinberojn kaj lentojn. En la vilaĝo mem kreskas multaj jakarandoj, kiuj nun plene floradas.



Aliaj rimarkindaj nun fruktodonaj arboj estas la mangoj, la papajujoj kaj la liĉiujoj. Nun estas la frukta sezono: ĉiuj ĉi arboj produktas siajn fruktojn en miriga kvanto. En la granda urbo Saint-Denis mangoj maturiĝas kaj falas sur la stratojn. Kelkaj homoj provas pluki ilin antaŭ la falo: ĉar tiu arbo estas tre alta, ili uzas longajn stangojn, kun korbo ĉe la fino. En nia ĝardeno estas papajujo, kies fruktojn ni jam manĝis en salato kaj konfitaĵo (kun papedo, alia tre bongusta frukto de ĉi tie).



Restas al ni multaj aferoj por rakonti!
Sed ni timas elĉerpi vian provizon de pacienco.
Venos novaj spertoj en la venonta numero!